

## LPLP lanĉas terminologian rubrikon

La revuo LINGVAJ PROBLEMOJN KAJ LINGVO-PLANADO, eldonata ĉe la Eldonejo de la Universitato Teksaso sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj dokumentado ĉe UEA (CED), inaŭguras novan rubrikon "Terminologio", ekde la unua numero de la sesa jarkolekto (1982).

La rubriko celas kontribui al la praktika lingvoplanado per notoj, ĉefe pri la **normigo da la lingvonomoj, la gentonomoj kaj la lingvistika terminaro, aparte la terminaro de la lingvoplanado**. Kontribuoj pri, la normigo ankaŭ de la esperanta terminaro en tiuj interesokampoj estas bonvenaj al konsidero. Oni sendu manuskriptojn, tajpitajn kun interspaco, al la redaktoro de LPLP:

d-ro *Richard E. Wood*  
*Dept. of English*  
*Southeast Missouri State University*  
*Cape Girardeau*  
 MISSOURI 63701, Usono.

*Abonojn, je prezo de US\$15,00 por unuopuloj kaj de US\$24,00 por institucioj, oni sendu al Journals Dept., University of Texas Press, P.O. Box 7819, Austin, TX 78712, Usono.*

### Honoro al Wood

Prof. d-ro *Richard E. Wood*, redaktoro de LPLP, estas nomita membro de la redakta komitato de la Kanada Revuo de Studoj pri la Naciismo, nacilingva revuo, aperanta ĉe la Universitato de la Princ-Edvarda Insulo. Ĝi okazis per letero de prof. d-ro *Thomas Spira*, ĉefredaktoro de la koncerna revuo. *Wood* iĝas la 23-a membro de la redakta komitato, flanke de aliaj membroj en Kanado, Usono kaj pluraj eŭropaj landoj.

La kanada revuo, kiu portas la anglalingvan titolon *CANADIAN REVIEW OF STUDIES EN NATIONALISM* kaj la francan ekvivalenton *REVUE CANADIENNE DES ETUDES SUR LE NATIONALISME*, estas plurlingva revuo, aperiganta artikolojn ĉefe en la angla kaj franca, sed foje ankaŭ en la germana aŭ hispana. La artikolo de *Wood*, "Elektitaj lastatem-paj studoj pri la lingva naciismo en la ĝermanaj lingvoj", aperis en la kajero de printempo 1981 de la revuo. Krome, *Wood* ofte verkas recenzojn por KRSN.

Temas pri la kvina membreco de *Wood* en redakta komitato de scienca revuo. Inter la aliaj redaktanecoj, ni citu tiun ĉe *LANGUAGE SCIENCES* (Tokio) kaj tiun ĉe *DISCUSSION PAPERS IN GEOLINGUISTICA*, angla serio.

## Rusaj toponimoj sur esperantaj mapoj

*B. V. Tokarev* (Sovetio)\*

La esperanta toponimiko havas kelkajn karakterizajn trajtojn, kiuj distingas ĝin de la toponimiko ĝenerala "la scienco pri deveno kaj evoluo de geografiaj nomoj, pri iliaj formo, senca enhavo kaj gramatika aspekto" (*Murzajev* 1974). Esperanto estas tre juna lingvo, do esperantaj toponimoj praktike ne havas pasinton kaj tial "la deveno kaj evoluo de geografiaj nomoj" ne povas esti studobjekto de la esperanta toponimiko. Sed antaŭ esperantisto staras grandioza tasko de alproprigo de grandega terminaro en ĉiuj sferoj de la scio. Kaj, ĉar la esperanta toponimiko ne povas rigardi malantaŭen, al la pasinto, kiun ĝi preskaŭ ne havas, ĝi devas limigi sin per rigardado nur antaŭen, ĝi devas krei nomojn ne ekzistantajn en tiu lingvo kaj perfektigi la ekzistantajn. Do, el ĝiaj taskoj restas nur — solvi problemojn pri formo kaj gramatika aspekto de la toponimoj. Nun la esperantistoj jam havas la unuajn mapajn eldonojn (Mondmapo 1968, Poŝatlaso de la Mondo 1971), kiuj donas sufiĉan materialon por pridiskuti, kiaj devas esti esperantaj mapoj. Kaj nia celo nun estas: unue formuli principojn de esperanta toponimiko kaj due — el vidpunkto tiamaniere fiksita pridiskuti la ekzistantajn esperantlingvaj mapojn.

### 1. Kiel skribi la geografiajn nomojn sur esperantaj mapoj.

Jen la unua demando ĉu uzi **originalan** skribadon por latinskribaj lingvoj, kaj nomojn de la nelatinskribaj transdoni kondiĉe per rimedoj de latina grafiko, t.e. **transliteri** ilin? Ĉu transdoni sonadon de la toponimoj per rimedoj

\* docento, kandidato de tehnikaj sciencoj, *Ŝirokaja 16, kv. 200, 129 224 Moskva.*

de esperanta grafiko, t.e. **transskribi** ilin? Aŭ uzi pure esperantajn, **asimilitajn** nomojn?

En la literaturo oni povas trovi tre diversajn vidpunktojn pri tio. *Zamenhof* (1962) opiniis, ke “Propran nomon oni devas skribi **nun** tiel, kiel ĝi estas skribata en la gepatra lingvo. Sed tio ĉi estas nur rimedo **provizora**: ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko internacia de tiu ĉi lingvo, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn”. La originalajn formojn li konsilas uzadi por la nomoj familiaj de ĉiuj personoj (esceptinte tiujn, kiuj mem esperantigas sian nomon), kaj tiuj nomoj geografiaj, kiuj, “estante ne tre gravaj kaj ne ofte renkontataj, ne povas esperi baldaŭ kutimigi la publikon al sia formo pure esperanta, aŭ kiĉs ortografio nacia estas tiel malegala al la ortografio esperanta, ke akceptinte formon esperantan ili riskas fariĝi tute nereboneblaj por la legantoj”. Por la nelatinskribaj lingvoj li konsilis uzi la nomojn “laŭ ortografio kaj fonetiko esperanta, t.e. ni esprimas la nomon per la sonoj kaj literoj uzataj en nia lingvo (ekzemple *Vjazma, Puŝkin*)”. Sed por la plej gravaj kaj ofte renkontataj nomoj li konsilis doni “karakteron pure esperantan”, Do, li fakte insistis pri ĉiuj tri formoj de la skribado, nur por diversaj okazoj. Li proponis ankaŭ manieron de transliterado por la rusa lingvo, (erare nomante ĝin “transskribo”) en kiu li signis molajn konsonantojn per posta (j), kaj la malmolajn per posta (u): *l(j)od* (glacio), *sm(j)ert(j)* (morto), *b(u)il(u)* (estis). Sed tiu sistemo montriĝis neoportuna kaj neniam estis uzata.

Nuntempaj esperantistoj ankaŭ turniĝas en la rondo de tiuj tri solvoj. *Tupicin* (1959) pledis kontraŭ la originalaj nomoj, insistante, ke oni devas uzi nur la transskribitajn. *Armand* (1967, 1969) ankaŭ insistis pri la uzado de la transskriboj, tamen proponas en krampoj aldoni la originalan skribadon. Konsciante neceson de deklinaciado kaj derivado li provis ankaŭ formuli ties regulojn, fakte enkondukante per tio la asimilitajn nomojn. *Albault* (1968) pridiskutis nur la asimilitajn nomojn de Mondmapo. *Gilbert* (1969) preferas uzi nomojn de la latinskribaj lingvoj nur en la originala formo kaj en krampoj prezenti iliajn transskribojn. La lastaj estas laŭ li la sola formo por la nomoj de nelatinskribaj lingvoj. *Auld* (1970) opinias ebla uzi originalan kaj transskribitan formon, unu en krampoj. Li indikis al tio, ke jam komenciĝas procedo de asimilado ne nur de la antaŭnomoj (el kiuj multaj estas oficialigitaj de la Akademio; v. *Sutkovoj* (1928), sed ankaŭ de la familiaĵo. *Seppik* (1974) male, pledas nur por la originalaj nomoj, allasante por nelatinskribaj lingvoj la transskribitajn, kaj nur por la plej gravaj toponimoj — la asimili-

tajn. Laŭ lia opinio bezonatas libro, en kiu estus mallonge klarigita elparolo de propraj nomoj de ĉiuj (!) latinskribaj lingvoj (en la mondo ekzistas pli ol cento da tiuj lingvoj); sen tiu dikega lernolibro oni, evidente ne povas legi esperantajn tekstojn. *Gomes* (1975) deklaras sian plenan aprobon pri opinio de *Seppik*, kaj ... tuj komencas pledi por asimilitaj nomoj, kvankam preferas transskribon, dum *Korseti* (1978) indikas, ke ĉiuj tri formoj en diversaj okazoj povas esti necesaj. Sed *Vaitilavičius* (1978) insistas pri uzado de la originala skribado, opiniante, ke “ĉia kripligo” (t.e. la asimilo) estas eĉ ofenda por loĝantoj de koncerna loko. Kiel ekzemplojn li mencias okazojn de altrudo al litovoj kaj estonoj de iliaj propraj toponimoj en formoj, asimilitaj de aliaj popoloj, forgesante, ke ofenda povas esti ĝuste tiu altrudo, sed ne la asimilo mem. Ja litovoj, same kiel estonoj kaj ĉiuj aliaj popoloj vaste praktikas la asimiladon de toponimoj de aliaj lingvaj regionoj por sia hejma uzado.

Fine ni pritraktu ofte uzatan manieron aldoni esperantajn sufiksojn kaj finaĵojn al originalaj alilingvaj vortoj, apartigante ilin per apostrofo. Tiu maniero estas malrajta, tiun funkcion de la apostrofo Esperanto ne havas, en “Fundamento” ĝi ne estas fiksita, kaj krome restas tute neklare, kiel do prononci tiujn naci-esperantajn hibridojn. Do, tiu maniero estas nekontentiga, kaj ne devas esti uzata. Kaj aldonado de esperantaj morfemoj al transskribitaj nomoj simple faras el ili la asimilitajn.

## 2. Necesas ĉiuj tri specoj de la skribado

el tiu tre bunta bildo. Jen unusola konkludo. La originala skribado necesas antaŭ ĉio por poŝtaj bezonoj. Ni ne povas atendi en proksima estonto, ke Tutmonda Poŝtunuiĝo akceptos unuecajn esperantajn toponimojn, kaj eĉ se tio okazos, la originala skribado estos bezonata por vojaĝantoj en koncernaj landoj.

Sed, ĉar nur sciinto de koncerna lingvo povas scii, kiel estas prononcataj tiuj toponimoj, necesas ilia transskribo per esperantaj literoj. Certe, pro diverseco de fonetikaj apartaĵoj de lingvoj, ĝusta transdonado de la prononco, ĝenerale dirante, ne eblas, sed almenaŭ la proksimuma necesas.

Kaj krome, ni bezonas formi diversajn derivaĵojn de toponimoj, kaj deklinacii ilin. Por tio estas necesaj jam pure esperantaj, asimilitaj nomoj, havantaj koncernan gramatikan finaĵon kaj esperantan akcenton. Do, ni pridiskutu aparte ĉiujn tri specojn de la skribado.

## 2.1. Originala skribado.

En septembro 1976 konferenco de UNO akceptis decidon, laŭ kiu devas esti uzata nur nacia skribado de nomoj de tiuj urboj, kies loĝantoj uzas latinan alfabeton. Sed ve, efektivigo de tiu decido ofte evidentiĝas tute neebila, ĉar por tio ĉiuj tipografioj de la mondo devas posedi literojn kun ĉiuj ekzistantaj diakritaj signoj aŭ post tajpado fari tre grandan permanan laboron por ilin aldoni. Da tiuj literoj en ĉiuj latinskribaj lingvoj ekzistas pli ol 200 (*Gilyarevsky, Grivnin* 1970); en la vjetnama skribo estas 62 da ili; sur teritorio de Sovetio la rekordon havas la litova lingvo (9 aldonaj literoj, l.c.). Fakte ne ekzistas unusola latina skribo, sed 80 diversaj skriboj sur latina bazo (l.c.). Tial la menciita decido, plej verŝajne, restos nur neefektivebla deziro. Bona ilustraĵo al tio estas la citita artikolo de *Vaitilavičius*, kie la nomo de la aŭtoro estas presita sen diakrita hoko super "c". Proksimume same statas la afero ankaŭ kun rusa skribo (60 aldonaj literoj, 40 diversaj skriboj (l.c.), kun la araba, *devanagari* kaj aliaj skriboj. Tial ofte oni devas kontentiĝi per **proksimuma** originala skribado. Pli bone statas la afero kun nelatinskribaj lingvoj. Certe, havi en tipografioj ĉiujn specojn de literaroj, ekzistantaj en la mondo, ne eblas, sed por multaj nelatinskribaj lingvoj estas ellaboritaj sistemoj de transliterado, el kiuj kelkaj jam estas oficialigitaj, ekzemple en Japanio kaj Ĉinio. Ni substrekas ĉi tie, ke la transliterado estas speco de la originala skribado, ĝi havas nenion komunan kun Esperanto, kaj tial plendoj (ke jen oni uzas por transliterado signojn, ne ekzistantajn en la esperanta alfabeto) kiujn oni povas ofte aŭdi, havas nenian bazon. **La originala skribado kaj transliteritaj vortoj servas ĉefe por ilin rekonigi kaj skribi; ĝuste prononci ilin povas nur sciantoj de koncerna lingvo.**

Ni devas substreki ankaŭ, ke laŭ nia opinio, sistemo de la transliterado devas esti ellaborata fare de kompetentuloj pri koncerna lingvo. Provoj solvi tiun (ofte tre malfacilan) problemon fare de homoj ne sufiĉe kompetentaj pri koncerna lingvo neeviteble enhavas tiajn aŭ aliajn neĝustajojn. Kiel ekzemplon oni povas citi studon de *Albault* (1972), en kiu la aŭtoro faras provon solvi la problemon de la transliterado por ĉiuj ses slavaj lingvoj, uzantaj cirilan alfabeton. Ne estante kompetentaj pri la aliaj kvin, ni povas nur aserti, ke transliterado de rusaj vortoj proponata de *Albault* estas tute nekontentiga. Li proponis dek tute novajn signojn, elektitajn arbitre kaj sen konsidero pri fonetikaj specifaĵoj de la rusa lingvo. Ekzemple li enkondukas specialajn literojn por mola signo - *ь*, malmola signo - *ъ*, kaj eĉ por i-mallonga - *й*,

uzas specialan literon, diferencon de *j*. Li ignoras ankaŭ tiun cirkonstancon, ke en la rusa lingvo litero *ѐ* plej ofte estas skribata kiel *e*, sen punktoj, kio devas esti konsiderata en transliterata teksto. La afero ne estas en tio, ke oni enkonduki kelkajn novajn literojn (tio estas la plej simpla afero), sed en tio, ke oni devas pleje redoni same ortografion, kiel fonetikajn specifaĵojn de la lingvo. *Albault* trovis necesa enkonduki 10 tute novajn literojn.

Ekzistas sufiĉe multaj sistemoj de transliterado de rusaj vortoj, uzataj en diversaj sferoj, kiel sistemo de Akademio de Sciencoj de USSR, sistemo de Ministerio de Ekstera Komercio k.a. (v. *Litvin* 1976). Oni postulas de tiuj sistemoj neŭtralecon, rilate latinskribajn lingvojn, komunuzeblecon, konkordiĝon kun tradicio. Ekzistas ankaŭ la Ŝtata Tutunia Normo (*Gost 16878-71*), kiu tamen estas kritikata, kaj tial ne ŝajnas stabiliĝinta. Ĝenerale la menciitaj postuloj, kaj ankaŭ tiu de plej ĝusta transdono de la fonetikaj apartaĵoj, kontraŭdiras unu la alian, kaj verŝajne ne eblas sistemo, respondanta al ĉiuj postuloj samtempe. La lastan el ili pleje respondas la menciita sistemo de Akademio de Sciencoj de USSR 1951-56, ellaborita dum pasintaj jardekoj fare de la plej kompetentaj sciencistoj, fakuloj pri la rusa lingvo, kaj konkordigita kun sciencaj transliteradoj de aliaj kvin slavaj lingvoj, uzantaj la cirilan alfabeton — blankrusa, ukraina, bulgara, macedona kaj serba, kaj kun ortografio de kelkaj latinskribaj lingvoj — ĉeĥa, slovakaj, slovena, luranica, kroata, litova k.a. Ĝuste tiu sistemo trovis vastan aplikon en geografio. El ĝi oni tre facile povas ricevi la esperantan transskribon. Relaborita sistemo de Akademio de Sciencoj 1968-72 ŝajnas al ni malpli bona, kaj krome ĝi ankoraŭ ne trairis praktikan elprovon. Tial ĉi tie ni pridiskutas nur la Akademian sistemon 1951-56. La plejmulto da rusaj literoj estas transliterataj en ĝi laŭ tute evidenta maniero:

a = a; б = b; в = v; г = g; д = d; з = z; к = k;  
л = l; м = m; н = n; п = p; р = r; с = s; т = t;  
у = u; ф = f; ц = c;

Transliterado de aliaj literoj estas prezentita en tab. 1.

Sed la sistemo akademia ne estas tute senmanka. En ĝi ne estas antaŭvidita kunmetaĵo *ѣ* = jo; la rusa litero *х* (= ĥ) en ĝi estas transliterata per 'ch', kio inter esperanta teksto povus esti legata kiel 'ĉ'; tial estas celkonforme uzi por tiu litero 'ĥ'. Alia manko estas la transdonado de litero *ѡ*. En la rusa lingvo ĝi estas renkontata plejparte en komenco de vorto kaj post vokalo, tial ĝi povas esti transliterata kiel 'e', sen ebleco miksi ĝin kun la rusa 'e', kiu en tiuj

pozicioj estas legata kaj transliterata kiel 'je'. Tamen ekzistas nemultaj rusaj vortoj, kie *е* situas post konsonanto, kaj estas miksebla kun la rusa 'e'. En similaj okazoj oni povas signi nemoliĝon de antaŭa konsonanto per duobla apostrofo ("citsigno"): (montaro) — la du solaj tiaspecaj toponimoj, kiujn la aŭtoro trovis sur mapo de Rusio.

Tab. 1

rusaj literoj	akademijaj reguloj de transliterado 1951-56	modifoj, proponitaj de l'aŭtoro	tradicia esperanta transskribo
е	e: post konsonanto, je: en komenco de vorto, post vokalo, ъ, ъ	same	same
ё	o: post ж, ч, ш, щ ó: post aliaj konsonantoj; jo: post vokalo, ъ, ъ	same	o: post ж, ч, ш, щ; jo: en aliaj okazoj.
ж	ĝ	ĵ, ž (jh, zh)	ĵ
и	ji: post ъ; i: en aliaj okazoj	same	same
о	o	jo: post ъ; o: en aliaj okazoj.	same
х	ch	ĥ	ĥ
ч	ĉ	ĉ (ch)	ĉ
ш	ŝ	ŝ (sh)	ŝ
щ	ŝĉ	ŝĉ (shch)	ŝĉ
ъ	ne estas transdonata	same	same
ы	y	same	i
ь	' : en fino de vorto kaj antaŭ konsonanto, forlasata antaŭ vokalo.	same	j, forlasata antaŭ vokalo
э	e	e: en komenco de vorto kaj post vokalo; 'e: post konsonanto.	e
ю	u: post konsonanto, ju: en komenco de vorto, post vokalo, ъ, ъ	same	u: post ж, ч; ju: en aliaj okazoj.
я	a: post konsonanto, ja: en komenco de vorto, post vokalo, ъ, ъ	same	a: post ж, ч; ja: en aliaj okazoj.

Transliterado kaj transskribo de rusaj vortoj en esperantaj tekstoj.

Simplaj estas ankaŭ reguloj de ĝusta prononco laŭ tiu sistemo por nerusoj: antaŭ la apostrofo, *e*, *i*, *j* — la konsonantoj estas molaj (ankaŭ 'l', kiu en aliaj pozicioj estas malmola, denta); 'y' — estas malantaŭlingva malalta 'i', (kiel en vorto 'cigno', la signo "montras, ke antaŭa konsonanto ne moli-

ĝas. La akcenton oni certe devas signi aparte. Entute en la transliterado estas uzataj nur tri neesperantaj signoj: la apostrofo (ĉar ĝi havas alian signifon, ol en Esperanto), la signo '' (tre malofte), kaj la litero 'y'.

Certe por esperantaj tekstoj estas pli oportunaj la literoj ĵ, ĉ, ŝ, ŝĉ, kutimaj por esperantistoj anstataŭ ž, ĉ, ŝ, ŝĉ. Se en la lasta okazo ŝ kaj ĉ devas esti prononcataj aparte, metebblas inter ili la signo: ŝ-ĉ. Kun tiuj korektoj kaj ŝanĝoj la sistemo de la transliterado fakte transformiĝas al jam la nova.

Unu el mankoj de la sistemo akademia (1961-1956), same kiel de la ŝanĝita, estas neplena inversigeblo, t.e. malfacileco de rea transliterado. Tio ankaŭ ĉio koncernas la literojn o kaj ĉ, kiuj, se situas post ъ, ъ en transliteraĵo ne estas distingeblaj. Tio estas la specifa trajto de ambaŭ sistemoj, sekvo de ilia fonetika karaktero, kaj helpi tiurilate povas nur ortografia vortaro. Ankaŭ estas mikseblaj ъ kaj ъ, se ne scii, ke ъ troviĝas ĉiam post prefikso (kiun oni devas ja rekonii), dume ъ — neniam. Miksi tiujn du literojn kun ĵ fakte ne eblas, ĉar la unuaj du ĉiam situas post konsonanto, dume ĵ — neniam. Do, la sistemo akademia havas sufiĉe bonan inversigeblon; la plena aŭtomata inversigeblo estas atingebla nur post aldono de speciala signo por ъ kaj ĉ aŭ koste je perdo de ĝia fonetika karaktero, kiel estas en kelkaj aliaj sistemoj.

Ankaŭ simpla estas la transiro al sensupersigna skribado (ekz. ĵ = zh). ĵ(ž) transiras al *jh* (*zh*), ĉ — al 'ch', ŝ — al 'sh'.

## 2.2. Transskribado.

Kiel jam estis dirite supre, la transkribo estas uzata por transdoni proksimuman sonadon de alilingvaj vortoj per rimedoj de esperanta grafismo. La reguloj de la transskribo estis donitaj en lernolibro de *Kolker* (1978) sed ili enhavas kelkajn neĝustaĵojn. Ne estas konsiderita moleco de esperanta 'l', neĝuste estas traktita transskribo de rusa 'ë' post "siblj" konsonantoj, kaj nenio estas dirita pri "malmola signo" ъ. Ĝustigitaj reguloj de la transskribo estas ankaŭ prezentitaj en tab. 1.

Tre simpla estas regulo por transiro de la transliterado al la transskribado: la apostrofo transiras al 'j' (ne necesas post 'l'), kaj 'y' al 'i'; la signo estas forigata.

## 2.3. Asimilado.

Asimilo de toponimo komenciĝas tiam, kiam ĝi estas uzata en alilingva parolo, Tiam ĝia sonado estas konsiderata jam en alia sistemo de fonemoj kaj aliĝas. Tio plene koncernas Esperanton, kiu estas pli parola lingvo, ol la

skriba. Eĉ se parolanto perfekte posedas ambaŭ lingvojn, por transiro de unu fonema sistemo al la alia (plej ofte nur por unu vorto) necesas speciala atento kaj streĉo. Do, la asimilado komenciĝas sur nivelo de fonemoj, sed ne limiĝas per tio. En multaj lingvoj ekzistas fiksita akcento, kelkaj lingvoj (la litova, latva, Esperanto) postulas certan finaĵon, ĉar alie neblas deklinacii vorton kaj fari diversajn derivaĵojn, ekzemple, nomon de loĝanto de koncerna loko. Do, la asimilado estas neevitebla procedo, ĝi iras sendepende de homaj deziroj, kaj tial estas natura afero, ke sur mapoj la toponimoj estas donataj en formoj asimilitaj de koncernaj lingvoj, kaj ne ekzistas kaŭzoj fari escepton por esperantaj mapoj. Eĉ pli — sen asimilitaj toponimoj eldonado de la esperantaj mapoj simple perdas la sencon. Tial la bazo de esperantlingvaj geografiaj mapoj devas esti la nomoj asimilitaj, kion substrekis kompilintoj de la poŝatlaso (*Kavka, Pumpr* 1972). Sed estas tre malfacile doni precizajn regulojn por asimilo de nacilingvaj toponimoj. Estas evidenta nur, ke la asimilitaj nomoj devas havi koncernan finaĵon (-o aŭ -a), esperantan akcenton, kaj esti maksimume proksimaj fonetike aŭ grafike al responda originala nomo; kaj — tre grava kondiĉo — ili devas esti ellaborataj en konsulto kun kompetentaj reprezentantoj de koncerna lando. Ne ĉiam estas facila afero trovi tiajn, kaj ne estas mirige, ke niaj unuaj mapoj tiurilate ne estas neriproĉeblaj. Ekzemple, Kartvelio sur Mondmapo (1968) estas nomita “Georgujo”, kaj Tbiliso — “Tifliso”. En tiu okazo al homo de la koncerna nacieco respondas la vorto ‘georgo’, kaj al la virino — ‘georgino’. Post certa tempo en la esperanta preso aperis artikoleto de *Tkeŝelaŝvili* (1969), kiu indikis, ke kvankam en Kartvelio estas multaj Georgoj, sed tamen ne ĉiuj, kaj kial virinoj de tiu nacio devas esti nomataj same, kiel la floroj? Li proponis la vorton “Kartvelio” (aŭ “Kartvelujo”) kaj “Tbiliso”, ĉar la kartvela finaĵo ‘i’ estas samsignifa kun esperanta ‘o’. Tiam la homo estas nomata ‘kartvelo’ (preskaŭ same sonas tiu vorto en la kartvela singvo), virino — ‘kartvelino’, loĝanto de Kartvelio (ne nepre kartvelo laŭ nacieco) — ‘kartveliano’, la virino — ‘kartvelianino’. En tiu ekzemplo, kiel en guto de akvo, respuguliĝas ĉefaj postuloj al esperantaj toponimoj: facileco de formiĝo de vortoj por loĝantoj kaj nacioj, maksimuma proksimeco al originalaj naciaj vortoj.

### 3. Diskuto pri la sovetiaj toponimoj sur Mondmapo kaj Poŝatlaso de la mondo.

Ĉio dirita jam povas servi kiel bazo por diskuto. La esperanta toponimiko

estas relative postrestinta branĉo de esperanta terminaro. En perioda, belar-ta kaj alia literaturo jam delonge estas uzataj diversaj geografiaj nomoj, multaj el kiuj iĝis la tradiciaj, kiel ‘Varsovio’, ‘Moskvo’, ‘Parizo’, ‘Sevastopolo’ k.t.p. Sed jam delonge maturiĝis neceso de reguligo de tiu spontanea procedo. Tamen nur en 1968 en Jugoslavio estis eldonita la unua esperanta Mondmapo, enhavanta nur 850 toponimojn, ĉiujn — asimilitaj. En la ĉeĥoslovaka eldonaĵo Poŝatlaso de la Mondo estas jam 12.000 toponimoj, sed ... nur 4.200 el ili estas donitaj en asimilita formo; la aliaj — en originala skribo kaj en transskribo. La kompilintoj de PM faris grandegan laboron, kiun estas malfacile trotaksi. Ne estas dubo, ke tiu atlaso iĝos bazo por plua disvolvado de la esperanta toponimiko. Ni pridiskutos ĉi tie nur la toponimojn de Soveta Unio, lasante kritikon de ĉiuj aliaj al kompetentuloj de koncernaj landoj, kaj, ne estante kompetentaj pri ĉiuj lingvoj de Soveta Unio, ĉefe pridiskutos la toponimojn rusajn.

En la PM estas 1243 toponimoj de Soveta Unio (sur Mondmapo nur 70), el ili 24 estas donitaj en la originala formo, 255 — en la transskribo, kaj 964 en la asimilita formo. Ni pridiskutos ilin laŭ la sama ordo.

**La originale skribitaj toponimoj.** Ili estas sur mapoj de la tri ĉebaltaj respublikoj — Estonio, Latvio kaj Litovio, kies popoloj uzas latinan alfabeton. Sur la mapo de Estonio troviĝas 10 tiaj toponimoj, el kiuj du ŝajnas esti transskriboj de la rusaj transskriboj: *Tallin* kaj insulo *Sarema*; en la estona lingvo ili aspektas kiel *Tallinn* kaj *Saaremaa*. Ses toponimoj en originala formo troviĝas sur mapo de Latvio, kaj ok — sur mapo de Litovio, el ili du ankaŭ estas eraraj: *Druskininka* (anstataŭ *Druskininkaj*) kaj *Ukmerge*, kun preterlaso de supersigno (*Ukmergė*). Kiel oni devas ilin transskribi kaj asimili — decidu litovoj. La kompilintoj evitis transliteradon de rusaj toponimoj, mi trovis en la indekso nur la solan nomon — *Myla*, kiu tamen sur la mapo estas donita en la asimilita formo — Milo.

**La transskribitaj toponimoj.** La plimulto el 255 toponimoj estas transskribitaj tute ĝuste; nemultaj eraroj estas ligitaj kun mikso de *e* kaj *ĕ*. Devas esti ne *Belozersk*, sed *Belozjorsk*, ne *Beregomet*, sed *Beregomjot*, ne *Berezovka*, sed *Berjozovka*, ne *Mogilev*, sed *Mogiljov*, ne *Olekma*, sed *Olokma*, ne *Orel*, sed *Orjol*, ne *Priozersk*, sed *Priozjorsk*, ne *Semenov*, sed *Semjonov*. Ankaŭ laŭ la donitaj reguloj devus esti *Novaja Zemla*, sed ne *Novaja Zemlja*. Ĉiuj 255 transskribitaj nomoj transiras en la asimilitajn post aldono de la finaĵo -o, aŭ, se ili havas finan vokalon *a* aŭ *i*, post anstataŭigo de tiu vokalo per *o*. La kialo de la transskribo estas eksplikita de *Kavka-Pumpr*. Nome, la

eldonejo postulis lasi tiaspecajn nomojn senŝanĝaj, akorde kun la brita versio, liverinta la kartografian bazon por la versio esperanta. Cetere, ankaŭ la ĉeĥa versio aplikas en ĉiuj nomitaj ekzemploj *e*, sed ne *jo*, klare preferante grafismon antaŭ prononco.

**La asimilitaj toponimoj.** Ili estas la plej multenombraj (964) kaj plejparte tute bonaj. Tamen ne ĉiuj. La nomon de sia urbo barnaulanoj preferas skribi Barnaulo, sed ne Barnaŭlo, kiel en PM, kun translokiĝo de la akcento. Pro la sama kaŭzo 'Taŝauzo' estas pli bona, ol 'Taŝaŭzo'. Certe, en multaj okazoj la delokado de la akcento estas neevitebla, ekzemple por nomoj kun tipaj rusaj adjektivaj finaĵoj: *-ij, -vi, -oje, -aja*. La kompilintoj transdonis ilin per *-io* (Gorkio, Volĵskio, Proĥladnio, Groznio, Polarnio, Pervomajskio, Konstantinovskio), *-ojo* (Krasnoarmejskojo, Leninskojo, Lesozavodskojo, Bologojo), *-ajo* (Proletarskajo, Kuŝĉevskajo, Novoaleksejevskajo). Ĉio ĉi ŝajnas akceptebla, malgraŭ la iom nekutima por rusa orelo akcento, sed tiuj vortoj sonas ne pli strange, ol Voroneĵo, Sizrano, Baranoviĉo, Nikolajev, Joŝkarolo. Erara estas nomo 'Niĵnia Leninskajo', devas esti 'Niĵne-leninskajo'.

Necesas zorgi ankaŭ pri facileco de prononco. Ne hazarde urbo 'Bujnask' en PM esta nomita 'Bujnasko'. Eĉ pli malfacile estas prononcebla la nomo 'Kamennomostskajo', tamen trafinta en PM. La literoj 'st' estas tute superflujaj, neniu donas al si laboron ilin prononci. Ankaŭ estas malfacile prononci nomojn, en kiuj estas trouzita litero 'j'; kiel 'Novazempljo' sur M kaj la atlasaj 'Ĉjurupinsko', Ljubatino, Ljaĥovaj insuloj, Ĉeljuskina kabo, Ĉeljabinsko, Rjazano, Krasnijjaro (!), Krasnijkuto, Kaspijskio — ĉiuj ili estus pli bonaj sen 'j', restis ja sen tiu litero urbo *Br'ansk*, nomita en PM — Bransko. Oni devas ankaŭ ne forgesi pri la litero 'ĉ'; *Syĉovka* estu prefere Siĉovko, sed ne Siĉevko, Voloĉoko estas pli ĝusta, ol Voloĉeko.

Tre diskutibla estas demando pri allasebleco de tradukoj. La Dua Internacia Konferenco de UNO pri normaligo de geografiaj nomoj (Londono, 1972) proklamis "krucmilitiron" kontraŭ la t.n. tradiciaj nomoj, aŭ ekzonimoj, t.e. nomoj, malproksimaj de la originalaj. La konferenco alvokis al iompost-ioma ekstermo de tiuj nomoj, kaj anstataŭigo per naciaj formoj (*Litvin* 1906). Kaj tiu laboro jam estas farata. Ekzemple malaperis de sur mapoj Balkana montaro, ĝin anstataŭigis *Stara Planina* k.t.p. Certe multaj el la ekzonimoj firme eniris en aktivan leksikonan fonduson, donis multajn derivaĵojn, kaj ilia forigo jam fakte ne eblas. Al tiaspecaj ekzonimoj apartenas Nigra maro kaj Bonespera Kabo, kiuj estas same tradukataj en ĉiuj lingvoj,

sed ekzemple *Buenos Aires* estas tradukita (kiel Bonaero), ŝajnas, nur sur esperantaj mapoj. Fakte tiu tradukado kontraŭas la ĉefan principon de la asimilitaj toponimoj, kiujn proklamis ankaŭ la kompilintoj de PM: maksimuma proksimeco al originala nomo. Ankoraŭ pli malbona maniero estas traduki nur parton de toponimo, kiel ekzemple 'Novazemljo', Malnovkrimeo (prefere — Starikrimeo), Malnovruso (Stararus) k.t.p. sur PM. Ĝenerale principo de nepra traduko de kelkaj nocioj, kiel nov-, nord-, sud- k.t.p., prenita de la PM-kompilintoj, ne ŝajnas bona.

#### 4. Kelkaj rekomendoj.

Laŭ nia opinio, kiel jam estis dirite, sur esperantaj mapoj devas stari **nur asimilitaj nomoj**, kaj nur por kelkaj la plej gravaj ĉefurboj oni povas en krampoj sur la mapo doni originalan skribadon (aŭ transliteradon). En alfabeto ordo de la asimilitaj toponimoj devas esti kompilita ankaŭ indekso. Sed post ĉiu nomo, en krampoj oni devas indiki la originalan (responde — transliteritan) skribon, se ĝi ne koincidas kun la asimilita nomo, kaj ĝian transskribon (minuskle), se ĝi ne koincidas kun la originala aŭ translitera skribo (certe, kun indiko de akcento). La originalaj nomoj (ne nepre ĉiuj), signitaj per kursivo aŭ alimaniere, ankaŭ povas esti donitaj en la indekso, kun nepra cito al la asimilita toponimo. Tia sistemo pleje faciligos trovadon de necesa objekto sur mapo. Do, la indekso devas aspekti jene:

Grodno

Luberco (*L'ubercy, luberci*)

Mogilovo (*Mogil'ov, mogil'ov*)

Moskvo (*Moskvá*)

Oreĥovo-Zujevo (*Or'eĥovo-Zújevo*)

Razano (*R'azan', rjazánj*)

Rovno

Siktivkaro (*Syktivkar, siktivkár*)

Sizrano (*Syzran', sizranj*)

Varsovio (*Warszawa, varŝáva*)

*Warszawa* — v. Varsovio.

En sciencaj kaj publicaj tekstoj toponimoj ankaŭ devas esti donataj en la asimilita formo, sed ĉe la unua mencio en krampoj oni indiku ĝian originalan (transliteritan) skribon kaj ĝian transskribon (se necesas). En belarta literaturo originala skribo kaj transskribo povas esti indikitaj en piednoto aŭ komentario. Aliajn proprajn nomojn estus plej bone doni en teksto en la transskribo, kaj en krampoj (piednoto) — la originalan (transliteritan) for-

mon. La procedo de la asimilado estas neevitebla, ĝi progresas en ĉiuj lingvoj, kaj ne estas retenebla per alvokoj uzi proprajn nomojn nur en la originala formo, kaj eĉ per aŭtoritataj decidoj. Tio eĉ ne eblas, pro abundego da diversaj diakritaĵoj, kaj tuj aperas la demando — kiel prononci la nomojn, kiel ilin deklinacii kaj fari diversajn derivaĵojn.

## 5. Literaturo.

- Albault, A.* (1968): Nia geografia terminaro. — *Scienca Revuo*, 105-112. *Beograd*.
- Albault, A.* (1972): Translitera cirila alfabeto. — *Scienca Revuo*, 135-140. *Beograd*.
- Armand, D.L.* (1963): Transskribo de geografiaj nomoj en Esperanto kaj ĝia uzo por ordigo de nacilingvaj transskriboj. — *Scienca Revuo*, 84-90. *Beograd*.
- Armand, D.L.* (1969): Transskribo kaj prononco de propraj nomoj. — *Nuntempa Bulgario*, 1, VI. Sofio.
- Auld, W.* (1970): Pri la transskribo de propraj nomoj, unuavice en literaturaj tekstoj. — *Scienca Revuo*, 149-156. *Beograd*.
- Gilbert, W.* (1969): *Nuntempa Bulgario*, 11, 2. Sofio.
- Gilyarevsky, R.S., Grivnin, V.S.* (1970): *Languages identificatin guide*. — *Moscow*.
- Gomes, B.* (1975): La karaktero de la geografiaj propraj nomoj — specife pri la “gento/lando” — sencaj nomoj. — *Scienca Revuo*, 151-158. *Beograd*.
- Kavka, J., Pumpr, T.* (1972): Poŝtlatso de la Mondo. Kontribuo al geografia nomenklaturto en Esperanto. — *Scienca Revuo*, 3-27. *Beograd*.
- Kolker, B.G.* (1978): *Mejdunarodnij jazik esperanto*. p. 5 Ufa.
- Korseti, R.* (1978): Ankoraŭ pri la nomoj. — *Paco*, 1, 10-11.
- Litvin, L.P.* (1976): *Onomastika i norma. K probleme transliteracii russkih slovznakami latin-skogo alfavita*, 209. *O tak nazivajemih “tradicionnih” nazvaniah*, 246. *Moskva*.
- Mondmapo (1968). Red. *T. Sekelj*. Laŭ la decidoj de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj — Eld. Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto. *Geokarta*. Beogrado.
- Murzajev, E.M.* (1974): *Očerki toponimiki*, 3. *Moskva*.
- Poŝatlaso de la Mondo (1971). 80 mapoj fizikaj kaj politikaj, eĉ dekkoloraj. Informoj politikaj, administraj. Internaciaj organizoj, nomoj kaj flagoj. Eldonis, ellaboris kaj presis *Kartografie, n.p. Praha*.
- Seppik, H.* (1974): Propraj nomoj en Esperanto. — *Scienca Revuo*, 73-80. *Beograd*.
- Sutkovej, V.* (1928): *Esperanto-Russkij slovar*, 203-213. *Moskva*.
- Tkeŝelaŝvili, G.* (1969): El Tbiliso sunoplena. — *Esperanto-Gazeto*, 26, 11. Beogrado.
- Tupicin, G.* (1959): Pri la transskribo de personaj nomoj. — *Nuntempa Bulgario*, 4, 43. Sofio.
- Vaitilavičius, A.* (1978): Propraj nomoj — ne nur lingva problemo. — *Paco*, 5, 8-15.
- Zamenhof, L.L.* (1962): Lingvaj respondoj, 51-55. *Marmande*.

## Russkie toponimi na esperantskih kartah

*Toponimi doljni ukazivat's'a na esperantskih kartah v assimilirovannoj forme, no v ukazatele neobhodomio davat' takje original'noje napisanie (jesli vozmofno), i — v sluĉaje neobhodomosti — transkripciu. Assimilirovannaja forma doljna bit' vozmofno bliŝe k original'noj. Reŝajuŝĉim golosom pri ustanovlenii assimilirovan nih nazvanij, takje kak i pri razrabotke pravil transliteracii i transkripcii, dolfen prinadleŝat' kompetentnim predstavitel' am sootvestvujuŝĉih stran. Dl'a transliteracii russkih toponimov najboleje prigodni pravila Akademii Nauk SSSR 1951-1956, s utoĉneniami, predlagajemimi v natojaŝĉej rabote, gde privod'ats'a takje utoĉnonie pravila tradicionnoj esperantskoj transkripcii russkih slov.*

## Oficiala Organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

Direttore responsabile: Aldo de' Giorgi  
 Registrazione n. 2 del 3.2.82 presso il Tribunale di Pisa  
 Stampato nel dicembre 1982 — Presita en decembro 1982

## Enhavo

### N-ro 1 (139): esperantologia kajero

Kiom da reguloj vere havas Esperanto?	
(D.B. Gregor) .....	p. 5
El la plumo de akademiano Douglas B. Gregor	
(J. Kavka) .....	p. 9
Pri laŭeble internacia fonetiko de la nacilingvaj grafismoj por la propraj nomoj en Esperanto-tekstoj	
(M. Gomes) .....	p. 11
LPLP lanĉas terminologian rubrikon. Honoro al Wood .....	p. 24
Rusaj toponimoj sur esperantaj mapoj	
(B. V. Tokarev) .....	p. 25